

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

2014:3

## Floradas nun la tero – Den blomstertid nu kommer

Sveda teksto: Israel Kolmodin (1643-1709).  
Esperantigis: Åke Ahlrén (1918-2014)

1. Floradas nun la tero  
kun granda bel' kaj ben'.  
Vi venas, ho somero,  
ekĝermas herb' kaj gren'.  
Pro varma sunradio  
jam cedis frost-steril'.  
Kun ĝoj' vigliĝas ĉio  
al renaskiĝ-jubil'.
2. Herbejaj flor-bukedoj,  
kampara nobla gren',  
la riĉaj ĝarden-bedoj  
kaj arba verdo-plen'  
jen signoj al memoro  
pri l' vasta Dia bon'  
kaj Lia grac-favoro  
en ĉiu jarsezon'.
3. Aŭdiĝas birdoj trile  
kun mult-varia son'.  
Do kantu ni simile  
al la ĉiela tron'.  
Animo, gloru Dion,  
ĝoj-kantu Lin sen lim'.  
Li donas al ni ĉion  
por korpo kaj anim'.

---

## *Kongresaj partoprenantoj*



Fotograf Siv Burell



## LA ESPERO

Organ för Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694

2014 • 102-a jarkolekto

Fondita en 1913

**Redaktion:** Bengt Olof Åradsson och Olof Pettersson

**Frågor om prenumeration, adressändringar o. dyl.:**

Box 2276, 103 17 Stockholm, tel. 08-34 08 00.

sveda@esperanto.se

**E-post till redaktionen:** laespero@esperanto.se

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus Typografi & Bengt O Åradsson

**Tryck:** Pingvinpress, Råå

**Prenumeration 2014:** 200 kr.

Prenumerationsavgiften för La Espero ingår i medlemsavgiften.

Plusgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## ESPERANTOFÖRBUNDET

**Besöksadress:** Esperanto-Centro, Vikingagatan 24,  
113 42 Stockholm, tel. 08-34 08 00

**Postadress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**E-post:** sveda@esperanto.se

**Nätsida:** www.esperanto.se

**Öppettider:** Esperanto-Centro har begränsade öppettider. Ring i förväg!

**Plusgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**IBAN-konto:** SE50 9500 0099 6034 0002 0123

**Medlemsavgift 2014:**

Direktansluten medlem 200 kr.

Ungdomsmedlem (max 20 år) 100 kr. Medlemmar

under 30 år är samtidigt medlemmar i SEJU,

Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund.

Hel familj 300 kr (inklusive ett exemplar av La Espero.

Tilläggs-exemplar kostar 100 kr/år).

**UEA-avgifter och prenumerationer:** Leif Holmlund,

Kågevägen 40 B, 931 38 Skellefteå, tel: 0910-733810

## ESPERANTOFÖRLAGET

**Adress:** Box 2276, 103 17 Stockholm

**Postgiro:** 578-5

**Nätsida:** www.algonet.se/~eldona

**E-post:** eldona@telia.com

**Telefon:** 070-5850054

## ESPERANTOGÅRDEN

**Adress:** Esperanto-Gården, 680 96 Lesjöfors,

**Nätsida:** <http://www.esperantosverige.se/eg-om-oss>

**E-post:** egarden@esperanto.se

**Telefon:** 0590-309 09

## Manus till La Espero

sänds till Bengt Olof Åradsson

Nygatan 10A; 281 48 Hässleholm; tel 070-200 4574

**e-post:** laespero@esperanto.se

	Stoppdatum	Utkommer senast
Nr 1	15 januari	15 februari
Nr 2	28 februari	30 mars
Nr 3	30 april	31 maj
Nr 4	15 augusti	15 september
Nr 5-6	31 oktober	30 november

Utgivningsplanen är preliminär. Den som har brådskande information som måste komma ut senast ett visst datum bör ta kontakt med redaktören i god tid innan.

## LA ESTRARO INFORMAS

Årets svenska esperantokongress är över. Den blev både traditionell och ovanlig. Traditionell därför att den innehöll de vanliga inslagen av föreläsningar, årsmöten, träff med medlemmar i Rondo Langlet, andakt med KELI och musikinslag både på fredags- och lördagskvällen.

Ovanlig pga den inledande Verkstaden, invigning redan på fredagskvällen och nya inslag såsom rapport från Verkstaden med åtföljande diskussioner (se separat artikel) samt möjlighet att ställa frågor till styrelsen innan årsmötet. Detta senare hindrade dock inte att det uppstod diskussioner under punkten Aliaj demandoj på årsmötet, som för övrigt flöt på bra under ledning av Martin Strid. Hela styrelsen blev omvald, med undantag av suppleanten Roland Lindblom som undanbett sig fortsatta styrelseuppdrag.

Styrelsen fick i uppdrag av årsmötet att se över hanteringen av medlemsregistret och kommande kongressarrangemang, arbeten som redan påbörjats. Nästa års kongress kommer att hållas i Uppsala, efter inbjudan från klubben där.

Förutom medlemsregistret och kongressarrangemangen har styrelsen många andra stora och viktiga frågor att arbeta med, exempelvis utvecklingen av hemsidorna EsperantoSverige.se, Esperantoförbundet.se och esperanto.se, omhändertagande av SEF:s arkiv, medlemskontakter och deltagande i utåtriktade arrangemang, utformningen av La Espero osv.

Därför jobbar vi intensivt med att styra upp vårt eget arbete inom styrelsen för att få tid och kraft över till dessa och andra viktiga frågor. Känslan är dock att vi får mer gjort nu även om vi inte gör mer.

Delta gärna i SEF:s medlemsforum och Helt öppet SEF-forum i Diskutejo. Är du ännu inte medlem på Esperantosverige.se, gå dit och leta upp Membrigi under menyn Aktivi för att anmäla dig.

*Ann-Louise Åkerlund*  
ordförande



Till styrelsen

Tack för en bra kongress. Särskilt musiken var en härlig upplevelse. Att lära känna Stefan McGill var också fint, jag har några gånger hört honom föreläsa men inte tidigare lärt känna honom personligen.

*Bengt Nordlöf*

Eftersom omständigheterna tillät en förlängd kongress och styrelsen jobbar hårt med att ändra inriktning på verksamheten för att modernisera arbetssätt och rutiner samt demokratisera verksamheten, passade vi på att ha en så kallad *Verkstad* dagen före Svenska Kongressen i Lesjöfors. En sådan Verkstad innebär att man jobbar i grupp med ett specifikt ämne för att nå ett resultat. Med min handledarutbildning i metoden "Empowering Envisioning" ledde jag gruppen genom övningarna som företogs i olika konstellationer.

Ämnet var "Vad håller vi på med? – Vart är vi på väg?" och vi ville ha in idéer och önskemål från personer utanför SEF-styrelsen. Totalt elva personer anmälde sig vilket gjorde att deltagarantalet var det (av mig) hett efterlängtade och enkelt delbara 12 eftersom Stefan MacGill också deltog, både genom att informera oss, men också genom att uppleva lite svensk esperantorörelse. Han konstaterade att Verkstaden var väldigt lik de AMO-kurser för Aktivula Maturigo som UEA har dragit igång nu i vår. SEF ligger alltså i fas när det gäller arbetssätt, mål och medel.

Verkstaden startade efter lunch torsdagen 1 maj och vi körde på till 21-tiden. Alla fick chansen att fritt och utan att bli

avbruten av någon, formulera sina tankar om hur saker borde bli bättre. Vi övade i en teknik som kallas "djuplyssna", där lyssnarens enda uppgift är att hjälpa talaren att få sagt det den vill ha sagt, genom att inte göra någonting annat än lyssna. Alla idéer skrevs på lappar som sattes på väggen där alla gemensamt flyttade runt dem tills vi var nöjda med en tematisk indelning. Alla fick sedan fritt välja tema att jobba vidare med.

Vi fortsatte på fredag förmiddag med att jobba på hur vi ville presentera materialet för övriga kongressdeltagare som hade börjat anlända. Det blev även tid över till djupare diskussioner och möjlighet för alla som ville, att berätta vad just den personen tänkte göra för att dra sitt lilla strå till stacken. Tio personer tog chansen att meddela omgivningen hur de tänker göra mer för esperanto och vi kommer att följa upp hur det går för dem.

Det här arbetssättet upplevdes som givande och positivt av deltagarna och det finns intresse för att fortsätta den här förändringsprocessen. Det kan handla om seminarier för klubbar, organisationer eller i anslutning till olika arrangemang. Om det låter intressant, kontakta SEFs styrelse.

*Stella Lindblom,*

## Al la redakcio de La Espero!

En mia daŭriga esperanta grupo en Grábo ni post la SEF-kongreso diskutis pri Lesjöfors. Ni ankaŭ legis pri "Sam Ideano": "En la historio de la Movado, estis foje progreso, foje regreso, sed ĉiam kongreso".

Mi miras ke tiom malmultaj personoj sukcesis fari tiom multe por ke estu kongreso, malgraŭ la sento ke nun regas regreso. La nunaj SEF-estraranoj tamen donas al mi la senton, ke de tempo al tempo estos progreso. Bonege ke Stefan MacGill per sia pedagogia maniero prelegis. Laŭdon al ĉiuj, kiuj ebligis la kongreson!

*Siv Burell*

## 24-hora konstruado inter arbaroj

(Ĉerpo el rondletero de Stefan McGill)

La estraro de la Sveda Esperanto-Federacio (SEF) elektita antaŭ unu jaro realigas sian celon aktivigi la membraron, organizinte unu-tagan intensan metiejon tuj antaŭ ilia jarkongreso. Ĉi-jare tio okazas en la Esperanto-Domo en Leŝefoŝ (Lesjöfors), en arbare idilia sed izolita okcidenta Svedio.

La metiejo sub gvido de nova estrarano Stella Lindblom altiris dekduon da labor-emuloj, ĉiuj iumaniere multjaraj aktivuloj. La tasko estis analizi siajn dezirojn por la movado, ĉu pri loka, landa aŭ translima agado, prepare al diskutoj kaj planoj por elformi novajn agadojn, direktojn kaj komunikeblojn por SEF, la aliaj svedaj asocioj kaj la Nordia regiono. Efektive, partoprenis kvar nesvedoj. ...

Aktivis en la metiejo kaj kontribuos al la kongreso la vic-prezidento de UEA, Stefan MacGill, kiu ja respondecas pri rilatoj kun la Landaj Asocioj ene de la subteamo 'Movado' ĉe UEA. ... Leviĝis plufoje la deziron, ke UEA pli aktive disponigu modelojn por informiloj, transpreneblaj kaj adapteblaj al lokaj bezonoj.

La laboroj pluiris diversforme, kun plene dek du horoj da laborado, ĉu en pleno, ĉu per plenumo de unuopulaj taskoj, para aŭ triopa diskutado; organizita, tiel ke ĉiu aŭdigu siajn spertojn, ideojn kaj (foje) frustrigojn. Sukcesa estis la surslipigo de koncizaj tekstetoj kun bezonoj, deziroj aŭ strategioj, kiujn grupanoj fizike rearanĝis en kelkajn grupojn, kiuj formis la bazon por la sekva vico de diskutoj.

Oni starigis demandojn ne nur 'kion faru SEF ekde nun' sed ankaŭ personan defion: "Kion VI faros post reiro hejmen?" ... Fine, starigis etoso kaj nivelo de interago atingebila, nur post la multaj pli fruaj horoj da pretigaj ekzercoj. Estas firma intenco, ke la nuna metiejo ne estu unufoja farajo sed la komenco de procezo. ★



## Nova seniorcentro en Brandbergen

H aninge komunumo apud Stockholm malfermis novan seniorcentron kun la nomo Gnistan (Fajrero). Ĝi enhavas plurajn ĉambrojn por diversaj “laboroj” por la gesenioroj. Oni aktivas pri gimnastiko, kafotrinkado, diskutoj, kudrado, pentrado, literaturcirkloj, puzlokonstruado kaj oni ankaŭ montras intereson pri esperanto.

Kerstin Rohdin prezentis kio estas esperanto kaj kiel uzi ĝin. Kial lerni ĝin?

20-persona grupo kun granda intereso aŭskultis. Postan fojon la grupo lernis kelkajn frazojn kaj kun fiero konstatis, ke ili post duonhora ekzercado kapablis kun sia najbaro iom “paroli” esperanton. La konversacio temis pri nomoj, loĝloko, ĉu vi estas viro aŭ

virino kaj aliaj “gravaj aferoj”.

Trian renkontiĝon ni okupiĝis pri afiksoj kaj konstruo de vortoj en esperanto. Tio ja ĉiam estas la afero, kiu vekas la kreadon de la grupo. Tiuj tri fojoj donis “fajron” al la grupo por daŭra studado aŭ per lernu.net aŭ per koresponda kurso. Kerstin Rohdin vizitis Gnistan ĉiun semajnon por apogi kaj helpi la studentojn.


Estas granda ĝojo vidi kiel ankaŭ en Seniorcentro la vizitantoj interesiĝas pri novaj temoj kaj kiel ili kolektiĝas ĉirkaŭ informado pri esperanto. Dum tuta monato staris la ekspozicio de Hans Dahl meze en la ejo. Multaj homoj spektis kaj komentis ĝin.

*Kerstin Rohdin*

## Arne Lundkvist 95 jara

*Arne Lundkvist*, iĝis 95 jara la 14:an de majo. Li festis sian 95-jariĝon unue la 14:an de majo en Missionskyrkan en Värnamo kaj poste kun pli proksima rondo la 17:an de majo. Ĉeestanta reprezentanto de KELI kaj SEF ankaŭ gratulis lin.

/red



## Poŝtmarkoj de la futbala ĉampioneco en Svedio 1958

*Venis demandoj de Vieno. Ĉu iu leganto havas pli da informo? Jen la demandoj:*

Ĉu vi havas pluajn informojn pri jenaj glumarkoj, kiujn ni gardas en la Kolekto por Planlingvoj? Ĉu ili estis eldonitaj de la Svenska Esperanto-Förbundet? Mi anticipe dankas pro viaj informoj!

Korajn salutojn el Vieno,  
*Bernhard Tuider*

Sammlung für Plansprachen  
und Esperantomuseum  
Österreichische Nationalbibliothek  
Tel.: (+43 1) 534 10-731  
E-Mail: [bernhard.tuider@onb.ac.at](mailto:bernhard.tuider@onb.ac.at)  
Internet: [www.onb.ac.at](http://www.onb.ac.at)  
Facebook: [www.facebook.com/nationalbibliothek](https://www.facebook.com/nationalbibliothek)



## Vill du våga mer?

**S***prida esperanto* är syftet med SEF, men hur gör man? På Verkstaden i Lesjöfors pratade några om att de borde våga erbjuda sig att prata inför andra organisationer eller i skolor och liknande, men det finns också en stor osäkerhet kring vad man ska säga och hur. För att inte tala om hur man ska tackla den egna rädslan för att sticka ut näsan.

Vi funderar på att arrangera en ny Verkstad med fokus på just att hantera kontakter med omgivningen när man vill informera och upplysa. Om du är intresserad, hör av dig. Vi kommer att bestämma tid, plats och utformning beroende på hur intresset ser ut. Vi siktar på oktober-november och någonstans i mellansverige, om inte intresserade vill något annat.

Skriv till Stella med e-post [stella@bonadomo.se](mailto:stella@bonadomo.se) eller ring på 0565-80388. Du kan även sms:a på 070-48 700 48. Berätta om vilka aspekter av “sprida esperanto” du är mest intresserad av och i vilket område Verkstaden borde köras för att passa dig bäst. ★

## Välkommen till nya esperanto.se!

**D**en nya versionen av [esperanto.se](http://esperanto.se) är nu öppen. Det är en ren informationssida om esperanto på svenska. Hänvisa gärna nyfikna, grannar, vänner och släkt dit när ditt eget engagemang sviker. Där finns också möjlighet för intresserade att anmäla sig till ett allmänt hållet nyhetsbrev om esperanto på svenska. ★

**esp@ranto**

## Arkiva projekto

Dum multaj jaroj SEF uzis la kelon en la Esperanto-Domo en Lesjöfors kiel arkivejo. Tie troviĝas libroj kaj diversaj dokumentoj de SEF mem, sed ankaŭ de delonge mortintaj kluboj. Kelkaj klopodoj “fari ion” okazis dum la jaroj, sed la tasko estas tro granda por idealisma kaj sensalajra laboro. La movado ne estas sufiĉe riĉa por dungi iun por fari tiun ĉi laboron, sed per ekstera helpo eblas.

En la somero de 2013 Stella Lindblom bezonis iaspecan laboron. Pro multjara malsano kaj maldungeco eblas dungi ŝin per grandparta helpo de ŝtataj agentejoj. La estraroj de SEF kaj E-G pensis ke estus bona ŝanco kaj ni komencis diskuti la “Arkivan projekton” jam en aŭgusto 2013.

Ĉar Stella estas estrarano de SEF, ili ne rajtas dungi ŝin, sed ĉar la laboro efektive okazu ĉe Esperanto-Gården, ni starigis kunlaboran projekton. E-G dungu Stellan, ŝtataj agentejoj pagu plejparte de la salajro kaj SEF garantiu la lastan parton (proksi-

mume 17 % de la tuto). Per aliaj sendungitoj, nomitaj “Fas 3”, ni planis havi grupon por prilabori kaj la arkivon kaj la bibliotekon, kaj eble eĉ fari pli da taskoj, kadre de la projekto.

Ĉiu Fas 3-ulo kiu ĉeestas plentempe donas 225 kronojn ĉiutage al la dunganto. Per tiu mono ni povus financi la tutan projekton. Af (Arbetsförmedlingen – la sendunga agentejo) pagas la plej grandan parton kaj ni ankaŭ havas subtenon de RAA (Riksantikvarieämbetet – agentejo de praaj kaj historiaj aferoj). La resto – proksimume 17 % de la salajro – estas garantiita de SEF.

Stella komencis labori la 31-an de Marto en 2014. Ni ankoraŭ atendas la evoluon de Fas 3-uloj, ĉu troviĝas iu kiu bezonas tian taskon kaj ĉu tiu persono aŭ personoj scipovus plenumi la taskojn. Ni prilaboras tion. Tempo estas grava, ĉar Fas 3-uloj devas havi estron surloke, kaj la projekto finos la 30-an de marto 2015. ★

## Språkrådsdagen – reprezentante Esperanton

Ĉi tio ne temas pri “la tago de lingvoj” (*språkdagen*), sed “la tago de la Lingva konsilio” (*språkrådsdagen*), tuttaga evento kiun jare aranĝas la ŝtata organizo Språkrådet. Ĉi-jare ĝi okazis la 8-an de majo, kun la temo “La lingvo de la potenco kaj la potenco de la lingvo” (*Maktens språk och språkets makt*).

La programo konsistis el diversspecaj prelegoj pri la temo de la evento, sed grava parto de ĝi ankaŭ estis la interparoladoj kaj miksiĝado inter la partoprenantoj, dum la lunĉo kaj dum la paŭzoj inter la prelegoj.

La evento estis malferma al ĉiuj homoj, kiuj interesiĝis pri la temo kaj pretis pagi la aliĝkoston, do venis homoj el multaj diversaj organizoj: Migrationsverket, SVT, la kulturdepartemento, kaj multaj aliaj grandaj kaj malgrandaj organizoj, ŝtataj kaj ne-ŝtataj. Mi mem reprezentis, helpe de mia nomŝildo, la Esperantoklubon de Stokholmo. Do en konversacioj kun aliaj partoprenantoj, mi ofte klarigis kia estas la agado de Esperantoklubo de Stokholmo, kaj de Sveda Esperanto-Federacio, kaj pli ĝenerale kiel aspektas la Esperanto-movado nuntempe kaj kia estas ĝia origino.

La prelegoj de la evento havis jenajn titolojn: “Kiu aŭ kio decidas kiuj lingvoj ekzistas?”, “Pri feminismo kaj lingvo”, “Malsimetrioj kaj strategioj en konversacioj inter civitano kaj aŭtoritato”, “Gardhundoj de la minoritataj lingvoj – kun misio disseki la lingvaĵon de la potenco”, “Kial la potenculoj komplikas la lingvon kaj kiuj estas la sekvoj de tio?”, “La lingvo, se la aŭdantoj rajtas decidi”. Kvankam mi studas lingvistikon, la prelegoj traktis temojn kiuj estis por mi novaj, ĉar en lingvistika edukado oni ne multe parolas ekzemple pri kio estas bona lingvouzo, kial gravas havi klaran lingvaĵon – pri la kampo de lingvokonsilistoj, ĝenerale. Nur la unua prelego havis pure lingvistikan temon, kaj lingviston kiel preleganton. La ĉefaj temoj de la prelegoj estis do komunikado de aŭtoritatoj, klara lingvouzo, kaj minoritata lingvopolitiko.

Post la prelegoj venis ceremonioj por donado de premioj. Temis pri tri lingvo-rilataj premioj: Klarspråkskristallen – premio por klara kaj komprenebla lingvouzo, fare de ŝtata organizo; Minoritetsspråkpriset – por bonaj kontribuoj al la laboro pri minoritataj lingvoj; Erik Wellanders pris – por esplorado en la kampo de lingvoflegado.

Post tio, la programo finiĝis per libera miksiĝo inter la partoprenantoj, dum kiu oni ofertis al ni trinkaĵojn kaj manĝetaĵojn. Ni ne plu nur aŭskultis, sed povis interŝanĝi impresojn, spertojn kaj ideojn.

Tatu Lehtilä

## Nyöppnad samtalsmottagning på Vikingagatan 24

I det inre rummet på Esperanto-Centro erbjuder vi nu psykoterapi, stödsamtal och korttidssterapi. Vi kan också erbjuda litteratur- och skrivarkurser.

Varje människa har sin egen unika berättelse. I det psykoterapeutiska samtalet bidrar klienten med sin berättelse och terapeuten med sitt yrkeskunnande och sin erfarenhet.

Vi utgår ifrån en psykodynamisk grund. I den psykoterapeutiska processen har relationen mellan terapeut och klient stor betydelse. Med ökad insikt om sig själv och sin historia, ökar möjligheterna till förändring – mera medvetna val och nya förhållningssätt både till sig själv och till sin omgivning.

*Britta Walkama Ingestedt*

Leg psykoterapeut, spec pedagog erbjuder vuxna och äldre psykoterapi, stödsamtal samt samtal i grupp för äldre.

Mobil 072-250 19 49

[b.walkama@comhem.se](mailto:b.walkama@comhem.se)

*Åsa Adolfsson Wallner*

Dipl samtalsterapeut, fil kand och skrivpedagog erbjuder stödsamtal, korttidssterapi samt skrivarkurser.

Unga vuxna, vuxna och äldre.

Mobil 070-767 09 11

[tankespegel@gmail.com](mailto:tankespegel@gmail.com)

Välkommen till oss!





Ni jam de dek jaroj havas oficialecon, kaj UEA havas sanktan devon defendi la jamajn atingojn. Tiu kurso dependas je 15-20 homoj kiuj pretas studi dum tri jaroj, kun du vizitoj po jaro en Poznano, en lingvistiko, ek de ĉi aŭtuno. La nuna kurso havas bonan etoson kaj finis kun respektinda nombro da studentoj. Pri la apogo por administrado: Urĝe ili bezonas sekretarion, loke, kiu parolas la polan. Kaj fakte ni vidas ke la kursanoj venas el tre tre diversaj landoj, pluraj brazilanoj, japano sed ne tiom multaj el apudaj landoj.

Ni nun havas 12-14 homojn kiuj prizorgas (memstare) na ekzemple *lernu.net*, *edukado.net* kaj aliaj. Kial ni inventu la radon denove? Do ni diris, bone, edukado.net estu nia partnero. Pri lernu.net bedaŭrinde UEA maltrafis la buson antaŭ kelkaj jaroj kaj nun ni devas ripari tion. Ni havu bonan rilaton kun ili, trovi la bonajn partnerojn kiuj de si mem agas internacie. Estas tasko de UEA igi la homojn pensi internacie.

La trejnado de aktivula reto deterigis multe pli rapide kaj sukcese ol ni kredis. Tio estas kampo kie, laŭ la plano, UEA devas preni la gvidon. Kaj ni havos jam sep seminariojn ĉijare, en tri kontinentoj. Hungario, Kanado, Ĉinio, Italio, Brazilo,



Slovakio kaj Berlino.

Ni vizitis ĉiujn kontinentojn krom Oceanio. En la lokoj ili havas grandan aŭtonomion decidi kiuj estos la gvidantoj kaj la temoj. Ĝi estas tre malcentrisma modelo. Ni donas la konsilojn kaj ili surloke decidas.

Stefan ankaŭ rakontis pri AMO, kiu signifas *Aktivulan Maturigon*. La seminario mem nomiĝas SPAMO, *Seminario Pri Aktivula Maturigo*. Mono de Novzelando kovras buĝeton de trimil eŭroj por 2014, ĝi estas 1500 eŭroj por seminario. Ni donas monon al junaj homoj kaj al aktivaj homoj. 3 000 estas ankaŭ solvitaj jam por sekvonta jaro. AMO konkuras la mondon. La amoprogramo havas konton kaj eblas kontribui al ĝi. Vi povas skribi kaj diri "Donacon por AMO". Ĝi servos por venigi precipe junajn homojn kiuj vere aktivas en sia lando kaj ricevos monon por sia trejnado.

Pri la Retkurso "Esperanto Etape" – ILEI eldonas ĝin kaj UEA subtenas ĝin. Partoj estas serveblaj en poŝtelefonoj. La kurson verkis Stefan MacGill kaj desegnis Gábor Molnár, kiu ne estas esperantisto. La unua etapo enkondukas substantivojn, la dua adjektivojn kaj jam la tria ne-transitivajn verbojn. Ĝi estas ankoraŭ sen sono. La kurso estas pure esperantlingva. Trovu la retejon [www.ilei-mondo.info](http://www.ilei-mondo.info) kaj klaku maldekstre je Kurso Esperanto Etape.

Dimanĉe antaŭtagmeze ĉeestis 16 personoj la prelegon *Kiel agi internacie*. Ankaŭ tiun gvidis Stefan MacGill.

Resumaj notoj de  
*Martin Strid*

Fotis Siv Burell  
(se neniu alia estas menciita)



## Åke Ahlrén

25/5 1918 – 6/4 2014

Åke Ahlrén mötte jag första gången på 70-talet. Men det är främst under de senaste 10 åren som vi blev mera bekanta. Vi träffades på KELI-kongresser och även emellanåt när jag arbetade i Stockholm.

När jag tänker på Åke ser jag framför mig en ödmjuk, varmhjärtad medmänniska och en duktig esperantist. Han vann snabbt min respekt utifrån båda aspekterna.

Sin medmänsklighet levde han ut i konkreta handlingar såsom att åka

med hjälpsändingar till forna öststater och att stötta esperantister i Afrika.

Att han var duktig esperantist visade han konkret genom att översätta mer än tjugo kristna sånger och psalmer till Esperanto. De flesta återfinns i Adoru och Adoru Kantante. Till den senare var han medredaktör tillsammans med A. Burkhardt, W. J. Downes, H. A. Hoog och H. A. Rosbach.

Åke har lämnat spår efter sig i våra hjärtan och i vår sångskatt.

*Bengt Olof Åradsson*



Dekstre Åke Ahlrén 2005 en Hungario dum la ekumena kongreso. Apude sidas Albrecht Kronenberger, kunverkanto de ADORU.

## La unua eldono de METROPOLITENO \*

Ed Borsboom, NL

**K**iam mi en la komenco de la 70-aj jaroj laboris super la biografio “Vivo de Lanti”, mi legis la protokolojn de la SAT-kongresoj. En tiu de 1928 sub la rubriko pri la literaturaj SAT-eldonoj staris la frazo: *Precipe nin interresas la sorto de jena verko “Inter du bordoj” de V. Varankin.*

Tio kaptis mian atenton, ĉar eble la ruso Varankin riĉigis la esperantan beletron per valorajo. Mi nepre volis akiri la libron, sed neniu povis helpi, nur iu diris, ke la posta definitiva titolo fariĝis “Metropoliteno”. Jam komenciĝis la perdo de espero, sed en 1973 okazis miraklo.

Andreo Cseh grimpis kun mi tiam en la Esperanto-Instituto en Hago al ĝia subtegmento por montri tiun lokon. Starante en la polva kaj ne tre luma ejo inter kestoj kaj skatoloj mi subite vidis sur fenestro-breto unu kadukan libron. Mi surprizite vidis la titolon “Metropoliteno” kaj sub ĝi “*eldonon 1933 en Amsterdam*”. Ĉu vi legis ĝin? Ne, respondis Cseh, sed mi uzis ĝin en la 30-aj jaroj. Tiutempe mi

vizitis influriĉajn personojn por propagandi nian lingvon. Ili ofte reagis, ke en Esperanto ekzistis nur kajeroj kaj broŝuroj. Por senfortigi la argumenton mi kunportis tiun dikajn volumon.

Aperas nun la demando: Kial migris manuskripto, kreita en Moskvo, al Amsterdamo por esti eldonita? Varankin finis la verkadon de la romano ie en 1932. En tiu jaro ĝia eldono en Sovetio ne plu bone eblis, ĉar la enhavo ete kritikis la registaron, iom tikla faro. Krome la vorto Esperanto jam tiam sonis tie suspekta. La foliojn la aŭtoro sendis en 1932 al Germanio, pro tio, ke en Leipzig la juna komunisto Walter Kampf-rad estis fondinta en 1930 la esperantan eldonejon Ekrelo. Ĝi publikigis precipe tekstojn de rusaj aktivuloj. Evidentas, ke “Metropoliteno” povis trovi tie bonan lokon.

Antaŭ ol la preso efektiviĝis, la hitleranoj akaparis en januaro 1933 la potencon. Ili tuj ekĉasis komunistojn kaj inter alie enkarcerigis Kampf-rad. Tiu ĉi last-minute transigis la materialon al Amsterdamo, ĉar en la nederlanda ĉefurbo troviĝis inter la samideanoj grupo da fidelaj amikoj de Sovetio.

Tiuj ĉi apenaŭ posedis monon por la aperigo de supozeble 2000 ekzempleroj\*\*. Trovante presiston, kiu petis plej malaltan sumon kaj uzis plej primitivan paperon, ili samjare realigis la projekton.


Pro la modesta rego de la Internacia Lingvo kaj la ne-agleca kontrolo de la presprovaĵoj svarmas eraroj en la prozo. Tamen monumentan faron plenumis la amsterdamaj kamaradoj: ili savis unu el la plej gravaj esperantaj romanoj de la perejo. Omaĝon al tiuj sindonuloj.

Sed kiu aĉetis la ducentpaĝan beletraĵon? Malmultaj! En Okcidenta Eŭropo la majoritato de la verdsteluloj rigardis kun skeptiko al la situacio en Sovetio. Aĉeti produkton el tiu ŝtato signifis moralan subtenon al ties reĝimo. Plie pro la monda krizo kreskis la aro de senlaboruloj, kiuj apenaŭ havis monon por aĉeti “luksaĵojn”. Kaj en la lando de Varankin mem Esperanto fariĝis tiel danĝera, ke ĝiaj adeptoj kaŝis aŭ detruis siajn esperantajn objektojn.

Laŭ hipotezo mia ekzistas nun en la tuta mondo nur pli malpli 20 ekzempleroj de tiu unua eldono. La ceteraj atingis la rubujon, forĵetitaj de filoj kaj nepoj de la posedantoj aŭ detruitaj de la eldonejo mem. Je mia miro mi vidis inter la brokantaĵoj ĉe IEI unu ekzempleron kun la prezo de 50 eŭroj. Fakte bagatela sumo por tia unikaĵo.

\* ekzistas 2-a eldono 1977, 3-a 1992, 4-a 1992

\*\* ne pruvita nombro, sed kutime la kvanto en la 30-aj jaroj



1992-jara eldono



Varankin, la jaro 1931

### Ĉerpo el la libro:

Berlin ... de aprilo 1928.

Berlina aero instigas al verkado. Ĝi kreas la humoron. Mi, kiel ĉiu inteligentulo, ne povas verki sen la humoro. Jen, ekzemple: tra la malfermita fenestro estas videblaj mallarĝa tegola tegmento, radiomasto, du mansardaj fenestroj kaj kamen-tuboj. Malsupre kuŝas ŝtona puto — la korto kaj aŭdiĝas kanto pri Stefano Razin. La konata melodio sonas mirinde kortuŝe. Fingroj de la lerta harmonikisto faras el ĝi jen molan, dolĉan muzikon, jen fortan, potencon proteston. La harmonikisto ne havas piedojn kaj staras per iuj strangaj tre mallarĝaj kaj mallongaj hakpecoj.

Subita ekstremo trapenetas min. Mi rememoris unu aŭtunan vesperon. Per ĉi tiu novembra nebula vespero mi komencas mian romanon. ☞